Mimi Pinson. *Alfred de Musset. Tradukita de M. Rethel. Eldono de la Esperanto-Instituto, Venlo, Nederlando. 44 pp., prezo veršajne 0.66 guld.* Karakteriza rakonto pri Pariza studenta vivo. La traduko estas klara kaj bonstila, kun escepto de kelkaj modaj strangajoj : *kelkiu (iu)*, *ili faris nenion escepte (krom) fumi*; *deposit (de)*; *konatulo (konato)*.

***Cu vi aŭdis tion?** *Anekdotaro kompilita de S. Grenkamp-Kornfeld. 46 pp., 1s. 6p.*

Kolekto de 300 spritajoj, kvalite egalaj je tiuj en la similaj anekdotaroj jam aperintaj : t.e., ili estas sufice amuzaj, sed ne brilaj; lingve bonaj, sed ne perfektaj. Oni trovas ekz., *nek anstataŭ eĉ ne* (p.3), kaj *guste anstataŭ jus* (p.5). Ne mankas preseraroj : *fraso, sukcezis, mangi (=ne mangi)* (p.32). Entute rekomendinda kolekto.

***Jimmie Higgins.** *Upton Sindair. S.A.T., 372 pp., broš. 6s., bind. 8s.*

En la lasta tempo ni kutimiĝis al apero de plurcentpaĝaj romanoj, bone tradukitaj, presitaj, kaj binditaj. Valoraj libroj tiom torrentas el niaj eldonejoj, ke ni ne plu salutas ĉiun kun hurao, sed simple kritikas la erarojn. "J.H." apartenas al tiu kategorio. Longa, klasbatala romano, kies komenco iom tedas pro tro seka politikajo, sed kies ĉiu ĉapitro pli kaj pli absorbas, ĝis la harstariga, apenaŭ tolereble terura fin-ĉapitro. Tra la tuto martelas socialistaj logiko, ironio, kaj heroeco, miksitaj kun speco de religia mistiko. Temas pri la poioma kontraŭvola evoluo de mal-patriota usona laboristo al fervora frontsoldato, kiu tamen ene ĉiam retenas siajn idealojn; pri lia ofta malliberigo, liaj psikaj dilemoj, senreviĝo, 'perfido' al la armeo, kaj frenzeĝo kaŭze de duonoficiala torturado. Gi donas instruan bildon pri la tiamaj konfliktoj en Usono inter militistoj kaj pacifistoj.

Kelkaj scenoj forte frapas : la detruo de lia domo per bomb-eksplodo kaj la posta trovo de la strumpita gambo de lia edzino; lia amuza kaj kuraĝa konversacio kun la angla reĝo; lia agonio ĉe la fronto kaj en usona torturcelo. Elstaras kelkaj filozofajoj : "Unu homo

ne povas kontraŭbatali tutan komunumon, ne pensante kelkfoje, ke eble la komunumo estas iel prava"; "Pro kio batali por demokratio eksterlande, se oni devas fordoni ĉiun parton da demokratio hejme por gajni la batalon?"

Sed kial, kial germano tradukis anglalingvan romanon? Generale li bone sukcesis, sed foje li mistrafis la sencon de nacia idiotismo. Ekz., *nelonge* devus esti *ne plu*; *subjekto (temo)*; *centfojojn tiom multe kiel (centoble pli multe ol)*. Aliaj anglismoj : *Vi havos lin fendanta la krurojn, praktike la sama (preskaŭ), kion diablo mi volas kun via malnova graflando?*, *ſraŭbi la vizaĝon (tordi)*. Kio estas *stebliniaj sciuroj*? Cu *rigiduloj* estas *stiffs*? Cu eblas *jeti okulojn al iu*?

Eĉ pli Ĝena estas mistransskibro de angla nomoj : *Mike — Miĥaelo, Chalmers — Ĉalmers, Harrod — Herod, Gerrit — Geriti. D-ro Service* subite fariĝas *D-ro Servo* sen klarigo. Cu la nomo *Uol Strit* kaj ĝia derivajo *Uolstrita* plaĉas al vi? Fi! Kial la esp. publiko ne povu toleri nacian nomon nebuĉitan same bone, kiel ĝin toleras la ordinara publiko?

Ne mankas gramatikaj eraroj : *onies, alies, alien, da la*; kaj strangaj vortoj : *malgrata, gasoleo (petrolo), ŝuamio, pseŭ-dopodio, stenografino (-istino)*; kaj dubebonaj neologismoj : *ekskavatoro, ekvivokisto* (nebelaj), *kamiono, pajo* (ne sufice internaciaj). Ankaŭ preseraroj.

REVILO.

***La mondon al ni!** Erich Kilian. 72 pp., 1s. 9p.

Du junuloj forlasas siajn studiojn por semmone kaj senpasporte vojaĝi per faldebla boato tra orienta Eŭropo. Ili subtenas la vivon per manĝo aŭ mono donita de homoj okaze renkontitaj, aŭ almozpetita ĉe bonfaremuloj. Trovante, ke per Esperanto ili pli facile rekontos helpemajn amikojn, ili decidas lerni la lingvon.

Kuraĝo kaj aventuremo laŭdindaj! Tamen povas esti, ke tiu, kiu en la praktiko helpis al nekonataj aventuristoj, kaj kelkafoje havis kaŭzon bedaŭri konfidon mislokitan (kaj eĉ en Esperantujo tia afero ne estas nekonata), vidos la aferon de alia vidpunkto; kaj tion la aŭtoro mem konscias.

La lingvo estas bona, la stilo interesa kaj vigla: tamen oni devas iom aldoni image, por kompreni la historion (cu veran aŭ fiktivan?). Interesa esprimo : *mi malinvitas vin* (*you have outstayed your welcome*).

Dudek-kvina Universala Kongreso de Esperanto (*Köln, 29 Julio–5 Aŭgusto*). *Oficiala Dokumentaro.* 108 pp.

Oficiala protokolaro; kun raportoj pri la pasintjara agado de I.C.K., Konstanta Reprezentantaro, Lingva Komitato, k.a. La volumo estas ne seka teda oficialaĵo, sed tre interesa kaj faktoplena prezento de la tutmonda progreso de nia movado dum la jaro, kaj devus esti en ĉiu grapa biblioteko.

***La Mistero de l'Sango.** D-ro Otto Forst de Battaglia. *El germana lingvo tradukis Teo Jung.* Bind. 156 pp., 5s. 6p.

Cu vi scias, ke en la vejnoj de preskaŭ ĉiu reĝa familio de Eŭropo fluas sango de la Sankta Brigit, de la poeto Geoffrey Chaucer, de la profeto Mahometo, de la terura mongolestro Ĝiniskano? Cu iam vi pripensis, ke eble vi mem estas posteulo de tiuj aŭ aliaj eminentuloj de la malproksima estinteco? Tiajn temojn pritraktas la nuna libro, kiu rezultas el multjara detala studado pri la scienco genealogia. Ni tutkore rekendas ĝin al ĉiu, kiu interesigas pri la heredoscienco kaj ĝia signifo por la homa evoluo. Kvankam plene sciencia, ĝi estas facile komprenebla, kaj estas tiel zorge verkita, ke ĝi apenaŭ havas vorton superfluan. Portretoj kaj tre interesaj genealogiaj tabeloj akompanas kaj klarigas la tekston. En la nuna tempo, kiam rasteorioj kun tute nesufiĉa sciencia bazo ludas gravan rolon en la politiko, tia libro sendube meritas atentan tralegadon.

J. C. F.

For la viandon! Ses humoraj rakontoj de Viktorio Rakosi, en oportuna poſformato, lerte tradukitaj de Ladislao Spierer. 45 pp., prezo du respondkuponoj, ĉe Esperanto-eldonejo Ant. Prazak, Jablonne n. Orl., Ĉeĥoslovakujo.

***Esperanta Kantokolekto.** J. H. Vink. Kvin bildo. 32 pp., 10p.

Kolekto de 19 kantoj kun vortoj kaj melodio. La vortoj konvenas al la muziko (afero ne ĉiam renkontata ĉe kolekto tia), kaj la libro estas rekommendinda.

La influo de Vegetarismo al Morala kaj Socia Progresado. Karl Nebenzahl. 34 pp., 2 fr. fr., ĉe Eldonejo 'Vegetarano', Str. Dr. Istrate 10, Bukurešto V, Rumanujo. Biblioteko Vegetarana N-ro I. Pripensinda prezento de la preferindeco de vegetara dieto, aparte laŭ la vidpunktoj socia, ekonomia, kaj proleta.

***B.E.S. Adresaro.**—Jus alvenis la 11-a eldonon de ĉi tiu utila kolekto de adresoj de korespondemuloj. Dank' al sistemo de mallongigoj, oni havigas multajn informojn pri ĉiu el la mil personoj nomitaj; ofte kun foto. 92 pp., 1s. 6p.

***Petro.**—Kursa Lernolibro por Laboristoj. Sesa eldono (preskaŭ nešanĝita represo de la kvina eldono: necesa pro konfisko de pluraj miloj da ekz. en la germana presejo). 116 pp., 1s. 6p. La libro estas siaspece bona, sed kun la kutimaj SAT-eraroj. *Potage, pomonate,* estas ordinare evitindaj ne ĉar tiu uzo de *po* estas troa, sed ĉar ĝi estas erara. Oni konsilas al la lernanto (p. 72) uzi formojn malrekomenditajn de la Lingva Komitato kaj de Zamenhof, kun celo de "unueco." Sajnas, ke la unueco estas atingebla nur per disciplina forlaso de erara vojo. Cu *Japanujo, Hindujo, Persujo*, estas "Eŭropaj landoj"?

Jarlibro de la Lingva Komitato, 1934.—Regularo kaj Adresaro, kun aldono pri la Zamenhofa sistemo de landmonoj. 32 pp. 2 fr. fr., ĉe Esperantista Centra Oficejo, 11 Rue de Sevres, Paris 6.

Esencia y Porvenir de la idea de Lengua Internacional. — Hispana traduko de la Zamenhofa "Esenco kaj Estonteco", farita de D-ro Pompilio Romero el Honduras. 42 pp., 0.50 sv. fr., ĉe Amerika Esperanto-Instituto, 556 State St., Madison, Wis., Usono.

Rapporto de la Aerologia Observatorio de Tateno, N-ro 8. Jarlibro por 1930. Observadoj meteorologaj kaj aerologaj dum la polusa jaro 1932–33. N-ro 4 (Jul.–Dec., 1933). Prezo ne nomita. Jen la 11-a kaj 12-a volumoj eldonitaj en Esperanto de la Aerologia Observatorio, Tateno apud Tatiura (Ibaraki-ken), Japanujo, sub la klera redaktado de la direktoro W. Oishi. Ili konsistas grandaparte el ciferaj observadoj pri vento, humideco, temperaturo, aerpremo; kvanto, formo, kaj direkto de nubo; kaj observoj per kajto kaj balono, kun Esperanta teksto. Gratulinda iniciativo, sekvinda de aliaj observejoj. 188 plus 60 pp.

Protokolo de la 21-a Kongreso de Japanaj Esperantistoj.—20 pp., ilustrita. Prezo nemontrita. Raperto pri la kongreso okazinta 2–5 Novembro en Kioto kaj Kameoka, kaj pri ok fakaj kunvenoj. Multflanke tre interesa.

**Yo se leer el Español.* G. Gladstone Solomon. Heinemann, 2s. 6p.

Do you remember how you commenced to read your own language? You had no knowledge of grammar, but you were given a little book with simple words and ideas which you could understand. On these lines Mrs. Gladstone Solomon has written some delightful little instruction books for Esperanto, French and German. To this series *Yo se leer el Español* is now added. It should be one of the most successful, as the phonetic values of the alphabet of Spanish are regular, except that the letters "c" and "g" each have two sounds, and "h" is silent.

As well as to children, for whom it is designed, I would recommend the book to all students intending to take up the study of Spanish.

The absence of a vocabulary is in my opinion a good point. The pictorial association of the name with the object will please children, and concentrate their attention on the language.

As to "Rules for Pronunciation" I am not so satisfied. Other writers state that "b" and "v" are pronounced as in English; I think that this is good enough for the immediate purpose. The Spanish Academy regards them as dissimilar. Their proper sounds can be learnt only from a Spanish professor.

Hablar appears to be presented as a three-syllable word, but I do not think that this is the author's intention.

No special remark is made concerning the letter "rr", although its use is correctly suggested.

E. A. H.

Fine mi komprendas la Radion! Eugenio Aisberg. 140 pp., kun 245 klarigoj kaj amuzaj bildoj. Bros., 4.50 sv. fr. Bind., 6 sv. fr., ĉe Literatura Mondo, Mester utca 53, V, 7, Budapest IX, Hungarujo. Ne havebla ĉe B.E.A.

Ĉi tiu verko unue aperis en Esperanto en la gazeto *Internacia Radio-Revuo*. El tiu Esperanta originalo ĝi estis tradukita en 13 lingvojn, kaj ĉie trovis grandan sukceson. Nun fine aperas represo de la Esperanta originalo, kompletigita kaj plibonigita. Radio-ingéniero klarigas al sia nevo, tre scivolema sed inteligenta knabo, ĉion, kion oni bezonas scii por kompreni la radion. La libro estas tre interesa—ĉe por tiu, kiu nenion scias pri la temo—kaj plene rekomendinda.

***Jarlibro de la Esperanto-Movado, 1934.** Universala Esperanto-Asocio, Genevo. 336 pp., 4s. (por membroj de la B.E.A.)

Finfine aperis la Jarlibro longe atendita. Enhavo: Kalendaro; Artikoloj pri la organizo de la movado, la Interkonsento de Kolonjo, la Lingva Komitato (nomaro kaj adresaro); Detaloj pro organizoj landaj kaj fakaj, Institutoj, la Esperanta Gazetaro, la U.E.A.; kaj Regiona Adresaro de delegitoj kaj grupoj tra la tuta mondo. Ni povas proponi nur unu plibonigon: ke en postaj jaroj la volumo aperu akurate—kial ne jarkomence? Sendube la nunjaran prokraston kaŭzis la nenormalaj cirkonstancoj.

***La Teatra Korbo.** — Julio Baghy. 112 pp. 2s. 3p.

En ĉi tiu pensiga volumeto oni trovas diverstemajn meditajojn kaj skizetojn simple kaj bonstile esprimitajn en la formo de "senpretenda babilado". Por tiu, kiu konas la aŭtoron persone, ili ricevas aldonan ĉarmon el la fakteto, ke grandaparte ili havas aŭtobiografian karakteron.

El Franca Literaturo. Esperanta Legolibro de Mondliteraturo. Kajero Dua: Kompilita de N. Kawasaki. 67 pp., Prezo ne montrita. Japana Esperanto-Instituto, Hongo-ku, Motomači I, Tokio.

Eltirajoj el Daudet, Hugo, Merimée, Verlaine, Anatole France, Baudelaire, kaj Voltaire; tute karakterizaj, kun notaro japanlingva. La Kajeron Unuan ni ne vidis.

"LA JUNA VIVO."

Ni plezure ricevis la unuan numeron de *La Juno Vivo*, 12-paĝa dusemajna organo por la junularo. Jarabono: unu floreno, ĉe E. van Veenendaal-Bowwes, West-Graftdijk (N.H.), Nederlando. La gazeto celas esti simpla, neŭtrala, interesa, kaj malkosta. Ĝi estas agrable ilustrita, kaj bonstila. Ni rekomendas ĝin al lernejoj, kursoj, kaj ĉiu, kiu celas disvastigi Esperanton ĉe la infanaro. Oni petas alsendon de taŭga materialo: la enhavo ne estu tro simpla rilate temon, sed la lingvajo, kontraŭe, estu tre simpla (evitu kummetitajn tempojn, longajn frazojn). La rakontoj prefere havu edukan valoron. Specimeno 2p., ĉe B.E.A.

MOVADO FEDERACIA

Bristol and Somerset.—Aperis "La Bulteno", oficiala organo de la Federacio. La sennoma redaktoro estas gratulinda pri la unua numero (24 pp. kun kovrilo), la bonega kvalito de la enhavo, kaj la allogaj ilustraĵoj. Oni legas pri Esperanta Dometo konstruita en Bleadon, apud Weston-super-Mare, kie ĉiu Esperantisto povas ĝui malkostan libertempom en domo aŭ en tendo. La Bulteno vivu longe kaj utile!

Lancashire and Cheshire.—La Konferenco (14 Julio) en Southport estis tre sukcesa. La urbestro bonvenigis la vizitantojn per Esperantaj vortoj. Prezidis Prof. Collinson, kaj ĉeestis vizitantoj el aliaj landoj. Bona raporto kun fotografaĵo aperis en *The Southport Visiter*.

Southern.—La kunveno anoncita por 29 Sept. okazos 3.0 en Rechabite Hall, 86 Victoria Rd. N., Southsea.

MOVADO GRUPA, LOKA

Birmingham.—La Dimanĉa Rondo kunvenos 23 Sept., en Cafe Royal, Union St., je 3.30. Parolos F-ino Esther Richardson.

Cheltenham.—Cseh-kurso okazos ĉiutarde (Specimena leciono 18 Sept.), kaj daŭriga kurso ĉiujaŭde (unua leciono 27 Sept.) ĉe Teknika Kolegio, St. Margaret's Rd. Instruistoj : S-ro W. M. Appleby, S-ro A. Yates.

Edgware.—Elementa kurso okazos en Watling Centre, Orange Hill Rd., (Burnt Oak aŭ Edgware Stacidomo). 8.0-10.0. Pago : 4s. por 24 lecionoj. Unua leciono : 28 Sept. Propaganda Kunveno : 21 Sept.

Harrow.—Propaganda kunveno okazos 8.0 je mardo, 11 Sept., ĉe Bridge Cafe, 3a Railway Approach, Wealdstone (near L.M.S. Station).

London Club.—Kunvenoj okazas marde kaj vespere en Veterans Club Hall, 47 Bedford Row, W.C.1. 6.0-10.30. Kursojn sekvas bonega programo. Detaloj de novaj kursoj aperos en la venonta numero. *Vagadoj* : Sept. 2, Erikejoj en Surrey. 16, La marbordo. 30, Chelsfield, Otford, Eynsford.

London.—Diservo Esperanta okazos 9 Sept., ĉe la preĝejo St. Ethelburga, 72 Bishopsgate, E.C., je 3.30. Parolos S-ino Weston.

London, Ealing.—Elementa kurso okazos en Ealing Technical Institute, Warwick Road, W.5, vendrede, 7.15-9.15. Pago 10s. Unua leciono 21 Sept. Instruisto S-ro C. H. Kohl.

London, Mayfair.—Elementa kurso okazos en "Marylebone" Commercial Institute, Upper Marylebone St., Gt. Portland St., W.1., jaŭde, 7.15-9.15. Unua leciono : 27 Sept.

Supera Kurso por Progresintoj kaj Instruistoj okazos samloke marde. Unua leciono : 25 Sept. Propaganda kunveno : 18 Sept. Pago por la jaro : Unu kurso 10s., ambaŭ kursoj 12s. 6p.

London, New Cross.—Elementa kurso okazos en Goldsmiths' College, S.E.14 (Stacidomoj New X, New X Gate), merkredvespere, 7.30-9.30. Unua leciono : 26 Sept., 1934. Pago por la jaro : 10s. Propaganda kunveno : 19 Sept.

London, North.—Sept. 7, Ludoj. 14, Publikaj Kunvenoj. 21, Saradoj. 28, Ĉu mono estas la plej dezirinda afero en la mondo?

London, Plaistow.—Propaganda kunveno okazos en I.L.P. Hut, Cumberland Rd., E.13, je 7.0, dimanĉon, 16 Sept.

Norwich.—S-ro G. Davidson prelegis 18 Jul. antaŭ la Guild of Youth.

Nottingham.—Sept. 6, Interparolado. 20, La Kvakerismo. 26, Palais de Dance.

Paisley.—Sept. 4, Fairfield. 11, Bonnie Wee Well.

Swindon.—Propaganda kunveno okazos 17 Septembro. Detaloj ĉe L.A.C. Farr, 83 Croft Rd.

Sydney, N. S. Wales.—La loka grupo raportas, ke dum la jaro ĝi sukcesis enmeti en lokan gazeton *The World's News* serion da lecionoj pri Esperanto. El tio rezultis demandoj el ĉiu parto de la kontinento kaj el Novzelando. Oni arangis serion de publikaj kunvenoj, kaj tio ankaŭ venigis novajn membrojn. Ni gratulas la Societon, kiu laboras laŭ diro de la Sekretario en loko "ĉe la rando de la mondo", kie oni ordinare ne sentas grandan intereson pri lingvaj aferoj.

Worksop.—S-ro Bateman el Sheffield instruas kurson en la County Technical College.

MONOLOGO DE STENOGRAFISTINO

Ĉu edziniĝi aŭ ĉu ne? Tiel staras
Nun la demando. Ĉu pli noble estas
Elporti ĉiujn batojn, ĉiujn sagojn
De la fraŭlina sorto, kaj restadi
Nur stenotajpistino (laborante,
Ho, ve! por edzo de aliulino),
Aŭ per la edziniĝo ilin fini?
Liberi—ami—kaj nenio plu!
Konscii, ke ni tiel tute finis
Laboron de la plumo, la mil zorgojn,
Heredon de la poŝto—tio estas
Tre dezirinda celo! Flirti—ami—
Edzini! Jes—sed eble eksedzini!
Jen la barilo! Kiaj malbonaĵoj
Viziti povas nian gevivadon
Post la forĝeto de rutinaj devoj!
Jen tio nin haltigas; tio faras,
Ke nia fraŭlineco longe daŭras.
Alie, kiu volus elportadi
La mokojn kaj kapricojn de la estro,
La premon de laboro, la fiſercojn
De l' ĉefkomizo, polvon de la libroj,
Turmentojn de la bubo oficeja,
La katinecon, kiun ĉiu kolegino
Regalas al merito efektiva,
Haladzon de malkaraj cigaredoj
Malbonodorigantan ŝiajn harojn?
Jes, kiu volus tion ĉi elporti,
Se mem, per unu vorto ĉe la pastro
Si povus sin de ĉio liberigi—
Por kuirejo ŝangi oficejon,
Por forno aŭ lulilo skribmaſinon?
Kaj kiu do en ŝvito kaj en ĝemoj
La ŝargon oficejan volus porti,
Se ne pro tim' al riskoj kaj danĝeroj
De tiu nekonata land', el kiu
Neniu plu revenas, aŭ eskapas
Nur eksedziniĝante? Kaj pro tio
Plivolas ni elporti ĉion ĝenan,
Ol flugi al mizeroj nekonataj.
Ci tiu penso tenas nin fraŭlinoj.
La plej kuraĝa edzinemulino
Pro tiu kaŭzo haltas sendecide,
Kaj ĉio restas penso, sed ne faro.

A. E. M. B.

El "La Suda Kruco" (iom ŝangita).

Svedaj Naciaj Kostumoj.—Serio de dek kartoj en poštakarta formo; kr. 1.50, ĉe Eldona Societo Esperanto, Stockholm 1, Svedujo. La kartoj estas bele presitaj en koloroj, kaj prezantas kolekton de provincaj kostumoj.

Banurbo Aachen. (Aix-la-Chapelle). Sespaĝa flugfolio ilustrita, ĉe Städtische Verkehrsamt, Monheims-Alee, Aachen.

OFFICIAL NOTICES

President: P. L. Wright.
Hon. Secretary: Bernard Long.
Hon. Treasurer: Edgar de Knevett.
Secretary: C. C. Goldsmith, F.C.I.
Propaganda Secretary: M. C. Butler, M.R.S.T.

NEW MEMBERS

Burnett, James G.	London, S.W.9.
Constable, Miss R.	Reading.
Cresswell, L. E.	Shirley, Nr. Birmingham.
Davison, Mrs. Gladys H.	Birmingham.
Ferguson, M. G., M.A.	Harrogate.
Hall, Cyril A.	Gravesend.
Heaviside, Herbert F.	Doncaster.
Holland, John W.	Leighton Buzzard.
Lord, Alfred	Doncaster.
Patterson, Anna D.	Barrow-in-Furness.
Peter, Mrs. Katherine H.	Callander.
Reed, Sybil V.	Letchworth.
Reed, Mrs. Violet	Letchworth.
Rogers, Frank J.	London, E.13.
Rose, Mrs. Hilda A.	Dagenham.
Sharrock, Henry	Preston.
Shemming, John B.	South Harrow.

DONATIONS TO B.E.A.

General Funds.—Maidstone Esp. Soc., £2. 15s.; Miss N. E. Powers, 10/-; H. Blakey, Miss E. Dovey, G. Stewart, 5/6; C. E. Barnes, Miss K. Bennett, Miss F. McLaren, 5/-; Miss P. W. Worden, 4/-.

Advertising Fund.—G. D. Buchanan, 12/-; Miss N. E. Powers, 10/-; Malo Palmistry, 6/3; H. Blakey, Miss R. Constable, Miss E. Dovey, E. W. Sloper, G. Stewart, 5/6; R. M. Buchanan, 5/-; G. B. Warren, Miss P. W. Worden, 4/-; A. M. Macquarie, 1/3; W. Heap, 1/2.

Capital (50,000 Shillings) Fund.—Esperantisto 8820, £25.

EXECUTIVE COMMITTEE MEETINGS

June 22nd.—Present: The President, the Hon. Secretary, Miss Blake, Miss Davey, A. C. Oliver, R. Robertson, Miss Rook. The Secretary was authorised to proceed with a scheme for a competition, the prizes in which would be trips to the congress in Italy in 1935.

July 13th.—Present: The President, the Hon. Secretary, W. H. Matthews, A. C. Oliver, R. Robertson, Miss Rook, F. E. Wadham. Details of the arrangements for the Italian competition were discussed and approved. An announcement of this will be broadcast from Luxemburg on September 2nd at 5.45 p.m. Much routine business was transacted.

CECIL C. GOLDSMITH,
Secretary.

MORTOJ

Archer.—Je 27 Junio, en Watford, S-ro Francis G. Archer, dum multaj jaroj fervora membro de la B.E.A.

Bowker.—Je 11 Julio, S-ro Arthur Bowker, el Sheffield. Li multmaniere kaj influe subtenis nian aferon.

Higgens.—Je 9 Majo, F-ino C. M. Higgens, F.B.E.A., el Londono. F-ino Higgens estis unu el niaj plej fruaj membroj.

THE ESPERANTO STUDENT

Hon. Redaktoro : W. SEVERN.

AN INDEX TO ESPERANTO

PRONUNCIATION

VOWELS—*a, e, i, o, u*, pronounced *ah, eh, ee, oh, oo* without any diphthongal sound but as nearly as possible with the pure sounds heard in (*e.g.*) Italian. Approximate English equivalents are found in: *are there three or two.*

CONSONANTS—*b, d, f, h, k, l, m, n, p, t, v, z*, as in English; *g* as in *good*, *g* as in *gem*, *c* like *ts* in *mats*, *č* like *ch* in *church*, *s* as in *soon*, *š* like *sh* in *shell*, *j* like *y* in *yes*, *ž* like *si* in *vision*, *h* like Scottish *ch* in *loch* (seldom met with).

w resembles the English consonantal *w* and is used to form the diphthongal combinations *au* (like *ow* in *coward*) and *eu* (like *a(y)w* in *wayward*). The combinations *aj* and *oj* are like *y* in *my* and *oy* in *boy*, *ej* like *ay* in *saying* and *uj* as in *Hallelujah*.

r must (like all other letters) always be fully pronounced, *i.e.*, rolled: thus, *arbo* is not to be pronounced *ahbo*, but *ahrrbo*.

Every letter has fundamentally its alphabetical sound, but in fluent and natural speech the vowels are frequently somewhat shortened (thus the Esperanto *jes* is pronounced like *yes* in English).

In every word of two or more syllables a strong emphasis (or "tonic accent") must be given to the last syllable but one, thus: *patro, patrino, patrineco; lumma, malluma, mallumega.*

GRAMMAR

(Word-endings)

NOUN	ADVERB	ADJECTIVE
O plural J	E	A
	VERB	N accusative
U imperative	I infinitive	US conditional
IS past	AS present	OS future

By means of a useful series of prefixes and suffixes words may be built up from roots to show various shades of meaning, thus:—

FEMININES shown by IN suffix.

Viro—virino; patro—patrino; filo—filino; frato—fratino; kato—katino.

OPPOSITES shown by MAL prefix.

Longa—mallonga; kontenta—mal-kontenta; riĉa—malriĉa.

WORDS IN INTERNATIONAL USE.

Telefono, hotelo, teatro, opero, aeroplano, sporto.

COLOURS (koloroj).

Rûga, blanka, blua, oranĝa, nigra, verda, bruna, skarlata, griza, flava.

FLOWERS (floroj).

Rozo, lilio, violo, tulipo, krizantemo.

POINTS OF THE COMPASS (kompasso)

Nordo, sudo, oriento, okcidento.

NUMBERS.

Unu, du, tri, kvar, kvin, ses, sep, ok, naŭ, dek, cent, mil, miliono.

THE MONTHS (la monatoj).

Januaro, Februaro, Marto, Aprilo, Majo, Junio, Julio, Aŭgusto, Septembro, Oktobro, Novembro, Decembro.

FRUITS (fruktoj).

Oranĝo, banano, tomato, figo, piro, abrikoto, melono, citrono, groso.

Oni povas lerni Esperanton tre rapide.

One can learn Esperanto very quickly.

En unu horo oni povas akiri scion

In one hour one can acquire knowledge de la fundamenta gramatiko de la of the fundamental grammar of the lingvo.

language.

Knabeto : "Patro, kio estas

Little Boy : "Father, what is (an) idealisto?"

Patro : "Idealisto, mia filo, estas

Father : "my son,
juna viro, kiu kredas ke ĉiu
(a) young man, who believes that every
virino estas anĝelo."
woman (an) angel."

La gramatiko de Esperanto estas tre

The grammar of Esperanto is very simple.

Estas nur dek ses gramatikaj

There are only 16 grammatical rules.

Sinjorino (kolere) : "Kial vi ne
haltigis la omnibuson kiam mi signalis?"

Konduktoro : "Mi pensis, ke vi jetas al mi kisojn."

READ ALOUD.

Learners are strongly recommended to practise READING ALOUD. The Esperanto matter on this page is specially suited for such practice. Having mastered the phonetics of the language, read slowly, deliberately, and twice as loud as you would in English, and give careful attention to ACCENT.

SMALL ANNOUNCEMENTS

(1d. per word. Minimum 1/- per issue. Prepaid)

Copy must be received at our offices by the 6th of the month for insertion in the next issue.

64-page book about herbs that cure. 2d. Send for one and cure yourself. Trimmells, 144 Richmond Road, Cardiff.

Stamps for your correspondent—or your collection. I can supply suitable lots or single stamps at very low prices. Lists free. Stamps bought. W. M. Appleby, P.T.S., 32 Clarence St., Cheltenham, England.

Read how Esperanto is **Used**, in the Labour Movement in "Ruga Esperantisto," organ of British Labour Esperanto Association. 1½d. monthly, 1/6 year, post free. Sec. Smith, 36 Womersley Rd., N.8.

CU VI AUDIS TION ?

S. GRENKAMP-KORNFELD.

A collection of amusing anecdotes for all occasions.

ATTRACTIVELY PRODUCED.

Price 1/6, postage 2d.

BRITISH ESPERANTO ASSOCIATION,
142, HIGH HOLBORN, LONDON, W.C.1.

LA PLEJ BONA LUDO

por grupkunvenoj aŭ en la hejmo estas

LEXICON

Esperanta aŭ Angla eldono

2s. 6d., afranko 2p.

Ce
B.E.A.

AN EXCELLENT BIRTHDAY GIFT

for children, whether they know Esperanto or not, is the

ESPERANTO JIG-SAW PUZZLE.

About 150 pieces.
15½ ins. × 11¼ ins.

Price 2/6, postage 6d.

From the
B.E.A.

THE BRITISH ESPERANTIST

Publishers (Eldonistoj) : THE BRITISH ESPERANTO ASSOCIATION, 142 HIGH HOLBORN, LONDON, W.C.1. Telephone : HOLBORN 4794.

Editor (Redaktisto) : MONTAGU C. BUTLER, 36 PENRHYN ROAD, KINGSTON-ON-THAMES, SURREY. Telephone : KINGSTON 1484.

RATES OF SUBSCRIPTION (including postage to any part of the world)—Twelve months, 2/6. Single copies, Three Penny Stamps. (Free to B.E.A. members).

ADVERTISEMENT RATES will be quoted on application to the Secretary of the B.E.A.

JARABONO : 3 svizaj frankoj. Unuopajekzempleroj : po 30 centimoj (aŭ unu respondkupono). Oni sendu manuskriptojn al la Redaktisto. La Redaktisto resendos nur tiujn manuskriptojn, kiujn akompanas afrankita koverto, aŭ respondkupono. Li rezervas la rajton fari korektojn laŭbezone.

MANUSCRIPTS should be typewritten, and be addressed to THE EDITOR. Although care will be taken to return rejected manuscripts, the Editor does not hold himself responsible for loss or damage, nor does he undertake to return manuscripts unaccompanied by a stamped addressed envelope. He is not necessarily in agreement with views expressed in signed articles, but accepts responsibility for those unsigned.

THE BRITISH ESPERANTO ASSOCIATION consists of Fellows, Members, Patrons, Affiliated Groups, and Federations. The Annual Subscriptions are :—Fellows, 21/-; Members, 5/-; Junior Members (under 18), 2/6; Patrons, £1 1s. od.; Life Fellowship, £12 12s. od.; Life Membership, £5. (See prospectus).